Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**

# Festivala Kuriero

**03-a de aŭgusto 2020, numero 7**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Spertu Montrealon per motorciklo




Spertu Montrealon per motorciklo, danke al belega esperantlingva video de konata jutubisto BigBong! Sentu venton en viaj haroj – kaj antaŭĝuu 2022! Nepre enu al la merkreda Montreala ekskurso de VK (5-a de aŭgusto 2020, 12:20 – 13:00 UTC, merkredo).

## Sukcesa VEKI-ĝo de ILEI

Grosjean Mireille

Kun 350 partoprenantoj ni povas paroli pri la sukceso, sciante, ke niaj Kongresoj kutime arigas inter 70 kaj 170 personojn.

VIRTUALA ESPERANTO-KONFERENCO ILEI

Kun 75 programeroj, ĉiuj malsamaj krom du horoj, spekteblaj en ĉiuj horzonoj sen distingo, ni povas paroli pri bunta programo diversnivela, de babilado al serioza debato kaj al universitata prelego. Dek koncertoj plezurigis la partoprenantojn.

Kun efika prizorgado de la platformo fare de la slovaka firmao E@I sen unu sola paneo, ĉio iris glate kaj pli ol kontentige.

Enhave la konferenco estis tre fruktodona. Diversaj pedagogiaj spertoj aperis, kontakto inter universitatoj funkcias kaj kuras, novaj ideoj naskiĝis kaj jam estas en fazo de kontretiĝo. Plie multaj homoj povis revidi geamikojn, saluti fratece kaj babili libere. Brakumoj kaj kisoj vidiĝis surekrane. Do ni povis retrovi konatan kongresan etoson amikan.



Aldoniĝis vidbabilejoj, kun aŭ sen preciza temo, kie la ideoj furoris kaj brilis en libera etoso.

Kompreneble ILEI volas rekrei tian eblon en 2021, kun la espero, ke alveno al Edinburgo eblos por kelkaj vojaĝemaj esperantistoj sen virusaj bremsoj. Do ni nun planas **hibridan kongreson** por ebligi la partoprenon de foraj personoj, por kiuj la vojaĝo kaj alveno estas nesuperebla obstaklo. Ni bezonos por fari tion du kompetentajn personojn, kiuj kapablos filmi kaj sendi niajn diskutojn kaj prelegojn al la mondo kaj zorgi pri debatebloj tutmondaj. La Estraro de ILEI jam decidis pri senpaga restado por tiuj du teknikaj spertuloj. Ĉar ni diskonigas tiun alvokon en aŭgusto, iu neesperantisto povas kandidatiĝi nun kaj havas 10 monatojn por lerni Esperanton. Ĝis Skotlando, la dekan de julio 2021! Sed ni retrovu nin per la Reto jam nun tuj kaj regule tra la jaro!

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Pri la Kongresa Temo

## Virtuala Kongreso / UN 75-jara / kunsido pri la temo "paco", 2 aŭgusto 2020

### Enkonduka kontribuo

Ulrich Brandenburg

Karaj aŭskultantoj, saluton kaj bonvenon al la hodiaŭa diskuto!

Mia nomo estas Ulrich Brandenburg. Mi estas emerita ambasadoro de Germanio. Dum mia aktiva tempo mi multajn jarojn okupiĝis pri sekureca kaj defenda politiko. La planita Universala Kongreso en Montrealo kaj la nuna Virtuala Kongreso estas dediĉitaj al la 75-jariĝo de la Unuiĝintaj Nacioj. Nia kunordiganto Humphrey Tonkin petis min fari enkondukon por unu el la tri „kolonoj" de UN, pri paco (memoru ke la aliaj du „kolonoj" estas homaj rajtoj kaj ekonomia/socia evoluo). Mi registras ĉi tiun enkondukon meze de julio 2020.



La venko en la dua mondmilito estis je la origino de la Unuiĝintaj Nacioj. Post terura milito, kiu kaŭzis pli ol 60 milionojn da mortintoj, detruitajn landojn kaj multajn milionojn da rifuĝintoj, la mondo sopiris pacon pli ol ĉion alian. Tiun senton tradukas la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj en sia preamblo. La horo de la venko ankaŭ estis momento de – almenaŭ supraĵa – klareco. Estis klare kiu venkis, kiu malvenkis kaj kiu kulpis (cetere al la kulpuloj Germanio kaj Japanio oni dediĉis apartan formulon en la Ĉarto, kiu faciligis intervenon en kazo de revenanta milita risko). Al la fondantoj de UN kaj aŭtoroj de la Ĉarto ankaŭ estis relative klare, kiuj faktoroj kondukis al la milito aŭ almenaŭ faciligis ĝin: la frenezo de naciismo kaj la malforteco de la tiamaj internaciaj institucioj. Ili volis krei ion pli solidan. Kaj krome la venkintoj anticipe certigis ke la Unuiĝintaj Nacioj ne povu agi kontraŭ iliaj propraj interesoj. La Konsilantaro pri Sekureco havas kvin konstantajn membrojn, kaj tiuj kvin havas vetorajton.

Kio estas la Konsilantaro pri Sekureco? Krom la kvin konstantaj ĝi havas 10 nekonstantajn membrojn elektitajn por du jaroj. La Ĉarto donas al la Konsilantaro la ĉefan respondecon por la protekto de paco kaj sekureco en la mondo. Rezolucioj de la Konsilantaro laŭ internacia juro estas agnoskataj kiel fontoj de legitimeco: ĉu por la UN mem, ĉu por aliaj agantoj. Aparte gravaj estas la rezolucioj adoptitaj sub ĉapitro 7 de la Ĉarto: ili rajtigas ankaŭ uzi devigajn rimedojn kiel sankciojn kaj militistajn intervenojn. La Unuigintaj Nacioj, aliaj organizoj kaj registaroj havas longan praktikon labori surbaze de tiaj rezolucioj. Ĉiu kiu iam okupiĝis pri la Kosovo-konflikto konas rezolucion 1244 el la jaro 1999. Por Afghanio aparte gravaj estas rezolucioj 1378 kaj 1386 el 2001. Multaj rezolucioj estas regule plilongigataj, ne ĉiam sen problemoj: aktuala ekzemplo estas rezolucio 2533 el 2020, kiu permesas, sed reduktas la eblecojn liveri humanecan helpon al la regiono Idlib en Sirio.

La rolo de la Unuiĝintaj Nacioj por protekti la pacon ne limiĝas al rezolucioj de la Konsilantaro pri Sekureco. UN havas multjaran sperton de pacprotektaj operacioj: nuntempe funkcias 13 tiaj operacioj en 3 kontinentoj. Interese: la pacprotektaj operacioj de UN kostas nur 0,5 procentojn de la tutmondaj elspezoj por militistaj celoj. Tiuj operacioj en multaj kazoj helpis "frostigi" konfliktojn kiel partoj de pli ampleksaj politikaj kompromisoj. Preskaŭ neniam ili sukcesis --solvi-- konfliktojn. Antaŭ kelkaj tagoj oni memorigis nin pri aparte malĝojiga datreveno: la militkrimoj en Srebrenica en 1995, kiuj ankaŭ demonstris la senhelpecon de la internacia komunumo. En tiu kazo estis UNPROFOR, kiu havis nek la mandaton nek sufiĉajn fortojn por malhelpi tiun masakron. En la sama jaro cetere la Konsilantaro pri Sekureco sub ĉapitro 7 adoptis rezolucion 1031, kiu donis mandaton al internacia trupo organizita de NATO (tiutempe eĉ kun partopreno de Rusio) por interveni, disigi la batalantojn, kolekti

kaj detrui armilojn kaj zorgi pri ordo kaj sekureco. Temas do pri --pacdeviga-- operacio. Tiu rezolucio konfirmis la interkonsenton de Dayton kaj Parizo de novembro 1995, kiu celis ĉesigi la militon en Bosnio kaj Hercegovino. La rezolucio (same kiel 1244 por Kosovo kaj 1368 por Afghanio) estas unu ekzemplo de decido pri taskoj al pluraj agantoj, el kiuj la militistan parton transprenas ne la UN, sed alia organizo. Similaj ekzemploj estas konataj ankaŭ el aliaj konfliktregionoj, en kiuj lokaj aŭ aliaj organizoj (kiel la Afrika Unio, la Eŭropa Unio aŭ denove NATO) plenumas tiun rolon.

Post fino de la malvarma milito (en kiu ekzistis akra kontraŭstaro, sed ankaŭ ekvilibro de fortimigo) ne restis multe da tempo por festi. Paralele kaj tuj poste eksplodis „regionaj konfliktoj": denove mortis homoj aŭ devis fuĝi. Kaj tiu tendenco daŭras ĝis hodiaŭ. La nombro de lokaj militoj tutmonde triobliĝis inter 2010 kaj 2020. Pli ol 20 milionoj da homoj fuĝis el siaj landoj, pli ol 41 milionoj enlande. Preskaŭ 100 milionoj dependas de humaneca helpo, kaj tiuj nombroj konstante kreskas. Anstataŭ monda ordo – kiun aspiris la fondintoj de UN – aspektas kvazaŭ regus monda malordo. Nia „multpolusa mondo" ankoraŭ ne trovis ekvilibron. Suferas la homoj, sed suferas ankaŭ la reputacio de la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj organizoj, al kiuj oni riproĉas "krizon de internaciaj institucioj".

Tiu krizo estas reala, sed la institucioj havas nur tiom da potenco kiom la ŝtatoj pretas doni al ili. Eĉ se la "intergentaj bataloj" (Zamenhof: alvoko al la diplomatoj) nuntempe ofte okazas enlande kaj kondukas al subfoso kaj disfalo de ŝtatoj, en plej multaj kazoj tamen la --ŝtatoj-- konservas la finan aŭtoritaton. Ili kutime atentas pri defendo de nacia suvereneco kaj tendencas rezisti "enmiksiĝon en internajn aferojn". La emo fordoni kompetentecojn, rajtojn, monon aŭ eĉ soldatojn al internaciaj organizoj estas tre limigita. Inter la ŝtatoj kaj la Unuiĝintaj Nacioj hodiaŭ ekzistas alia ebeno: tiu de regionaj organizoj. Kelkajn el ili mi jam menciis; la Ĉarto pritraktas regionajn organizojn en ĉapitro 8. Por reveni al la alvoko de Zamenhof el la jaro 1915: li tiam jam pledis por "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo. Ja temis pri ĉefe eŭropa konflikto. La eŭropa unuiĝo sukcesis nur post plia terura milito. Ĝi restas malperfekta ĝis hodiaŭ. Tamen ĝi montras ke – se ŝtatoj pli intense kunlaboras kaj transdonas rajtojn al superŝtata organizo – tio povas kontribui al stabileco kaj prospero. Jes: milito revenis al Eŭropo ankaŭ post 1945, sed ne inter la tiamaj kontraŭuloj.

75 jarojn post fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj eblas diri: almenaŭ ĝis nun ni sukcesis eskapi trian mondmiliton. Al tio kontribuis UN, sed ankaŭ la spirito de internacia kunlaboro kaj la pli firma teksaĵo de institucioj, kiujn celis la aŭtoroj de la Ĉarto. Eble ankaŭ kreskis la sento de internacia respondeco pro la fakto, ke per atomaj armiloj eblas detrui la homan civilizacion en kelkaj horoj. Ni vivas hodiaŭ en multe pli interdependa mondo. Informoj (ĉu pravaj aŭ ne) disvastiĝas dum sekundoj. Tutmondiĝo tial povas helpi pli bone kompreni la tutmondan situacion, sed ankaŭ kreas novajn riskojn.

Kiam la mondo leviĝis el la ruinoj de la dua mondmilito, la taskoj ŝajnis klaraj, kaj por plenumi ilin oni kreis la UN. Hodiaŭ ne tiom da aferoj estas klaraj, kaŭzoj kaj efikoj pli komplikaj. En multaj landoj homoj fuĝas en naciismon aŭ postkuras populismajn movadojn, ĉar ili timas la defiojn de tutmondiĝo kaj sopiras je pli simpla mondo. Ĝi ne venos. Male: retiriĝo en paroĥismon kaj naciismon multobligas la kaŭzojn de konfliktoj. La fondintoj de la Unuigintaj Nacioj kuraĝis agi por eviti ke la historio ripetiĝu. Konservi la pacon hodiaŭ postulas ne malpli da energio, decidemo kaj klarvido. La esperantistoj (almenaŭ mi esperas tion) apartenas al la klarvida parto de la homaro. Lerni la lingvon kaj labori por paco kaj interkompreniĝo sekvas la saman logikon. La plej granda risko estas homa stulteco.




## Elŝutu senpage la libron de Mark Fettes

**Mark Fettes**
**Ne estas fido nur**
**Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010–2019**

PDF-versio de la libro «Ne estas fido nur» estas tute libere kaj senpage elŝutebla jam nun. Ankaŭ aperis ĝia papera versio. Post iom da tempo vi povos trovi ĝin en la internaciaj kaj landaj Esperanto-libroservoj, i.a. en la Libroservo de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).




# Internacia #Esperanto-Kongreso

**L.L. Zamenhof:** "Ĉar ni decidis kunvenadi ĉiujare el ĉiuj landoj de la mondo kaj multaj el ni faras eĉ tre grandajn oferojn, por povi partopreni en niaj kongresoj, tial ni devas klarigi al ni, por kio ni kunvenas. Se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo, kiel homoj, kiuj klare vidas antaŭ si la belan celon, al kiu ili iras; sed se ni ne konscios la celon de niaj kongresoj tiam ni baldaŭ tute malvarmiĝos por ili, kiel homoj, kiuj vagas sencele kaj kiujn tiu vagado baldaŭ lacigas kaj enuigas.

Por kio do ni kunvenas?

Ĉu ni kunvenas por paroli pri Esperantaj lingvaj demandoj? Ne! tiuj ĉi demandoj apartenas ne al la kongreso, sed ekskluzive al la Lingva Komitato, kaj por ili sufiĉus kongreso de komitatanoj.



Ĉu ni kunvenas por ekzerciĝi en Esperanta parolado? Por tio sola ni ne bezonas veturi al kongreso, ĉar en niaj hejmaj grupoj ni povas en la daŭro de la tuta jaro multe pli ekzerciĝi, ol en la kelkaj tagoj de la kongreso, kaj por la sola kelkataga ekzerciĝo en parolado neniu entreprenus vojaĝojn.

Ĉu ni kunvenas por fari manifestacion kaj sekve propagandon? Jes, certe! Sed ĉar el cent kongresanoj almenaŭ naŭdek-naŭ havas de Esperanto nur moralan profiton, por kio do ni ĝin propagandas? Mi ne dubas, ke plimulto el vi donos al ni nur unu respondon: ni faras manifestacion kaj propagandon por la Esperantismo ne pro ia utilo, kiun ĉiu el ni persone povas havi de ĝi, sed pro tiu gravega signifo, kiun la Esperantismo havas por la tuta homaro, pro tiu komune homa celo, kiu nin, aktivajn Esperantistojn, altiris al Esperanto; ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la Esperantismo en si enhavas.

Kiel la antikvaj Hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo monoteisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo Esperantisma. Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj."

*El Parolado de Zamenhof en la tria Universala Kongreso de Esperanto (Cambridge – la 12an de aŭgusto 1907) Inspirita de la Internacia Esperanto-Instituto (https://mallonge.net/5a)*